



Subtene al la regiona, landa kaj loka agado



Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

ENHAVO n-ro 20 > • TEJO • AMO 84-85 aliroj • Kursoj • Madagaskaro • < mar. 30

TEJO serĉas talentulojn

Proksimiĝas la ĉiujaraj elektoj en TEJO, kaj bezonatas kandidatoj.

Estos utile, se kandidatoj povos subteni la estraron en iu(j) ajn el la subaj agadkampoj:

- Talento
- Adoleska Agado
- Egaleco
- Daŭripoveco

Krome, interesiĝo de kandidatoj pri la subaj agadkampoj estas bonvenaj:

- Kongresoj
- Pasporta Servo
- Kulturo

Por kandidatiĝi, sendu mesaĝon al elekta.komisiono@tejo.org ĝis dimanĉo la **27-a de Marto 2022** kun viaj vivresumo, motiviĝa letero kaj indiko pri la fakoj, kiujn vi pretus transpreni en la Estraro. EKO vidis la informojn (en svedlingva retpaĝo!) jam post la limdato, sed homoj en la TEJO-aĝo brave kuraĝu plue sendi proponojn.

Se vi scias pri taŭga kandidato, persvadu tiun sendi sian kandidatiĝon aŭ sendu mesaĝon al elekta.komisiono@tejo.org tiel, ke la komisiono mem povu kontakti la eblan kandidaton.




Elekta Komisiono de TEJO

Hans Becklin, Marc Konijnenberg, Ana Ribeiro, Tamiris Queiroz

**La jaro 2022: Jen tio muzike:
kunkantu: DU DI DU DU!**

Dankon al Perlo Miela pro la notoj



Aliroj al AMO – trovu la vojon!

AMO 84 (2 - 3 aprilo, sabate, dimanĉe)

Aliroj: <https://us06web.zoom.us/j/9762167620>

Necesos doni kiel pasvorton la nomo de nia lingvo tutminuskle. La retligo restos valida por AMO la 2an kaj la 3an de aprilo, ĉar la du pliaj prelegoj de BEMI okazos dimanĉe.

AMO kaj Erasmus+:-prelegaro pri 'Daŭripovo kaj Transporto' (9:00-12:00):

- o Malfermo de la seminario (SMG): 5 minutoj
- o Sara Spanò k Francesco Maurelli (IT-DE) : Pri la programo Erasmus+ kaj la projekto Verden
- o prof. Jaroslav Matuška (Ĉeĥio) : Universitato Pardubice kaj daŭripova transporto en partnera kunlaboro kadre de projekto Verden
- o Lars Sözüer (Svisio), Christine Brücker (DE) : Bicikloj en trajnoj - stato en diversaj landoj kaj vizio por la estonteco (prelego kaj laborgrupo)
- o studento. Matěj Berka (Ĉeĥio) : Kial mi aliĝis al la projekto Verden ?
- o Luc Gourin : Biciklovojoj sur iamaj fervojaj linioj 'verdaj vojoj' - NaturAmikaro - EuroVelo7

AMO-seminario pri 'Fervojo por daŭripova transporto' (14:00-17:00):

- o Stefan MacGill (NZ-HU) : Fervojoj kaj iliaj roloj por pli ekologia mondo - reta prelego
- o Rodica Todor, (RO) : La politiko de Eŭropa Unio pri fervojo kiel daŭripova, klimat-protekta kaj ekologia transportrimedo
- o Ladislav Hakl (CZ) : Internaj kaj eksteraj kondiĉoj por daŭripovo de fervoja transporto
- o Michael Boris Mandirola (IT-FR) : La Eŭropa Verda Pakto
- o Franco Bressanin (IT) 1 : Se ne ekzistus plantoj ...
- o Franco Bressanin (IT) 2 : La klimato kiu estas ŝanĝanta: adaptiĝi aŭ komforte sidi sen fari ion ajn? (La verda fervojo)
- o Vito Tornillo (IT) : Hibridaj trajnoj.

BEMI kontribuu per tri programeroj:

1. Survoje al formorto, 90 minutoj
2. Efiko de trafiko al la klimato, 45 minutoj
3. Plano por evoluigo de retejo pri biciklotransporto en trajnoj, 90 minutoj.

Nur la tria aperas en la supra skemo. La pliaj temoj povos okazi en la posta tago, plus ankoraŭ pliaj eroj, eventuale.

La enkonduko de SMG (14:00 en tiu sabato) estis jam dissendita kun EKO 18.

AMO 85 (8-9 aprilo)

La Zoom -alirkodo estas <https://huji.zoom.us/j/7508982919>

La tri prelegoj rezervitaj por AMO estas videblaj en la programo de la IK:

<https://www.esperanto.org/il/ik.html#programo>

Ni lasas en nia prezentaĵo kelkajn koncertojn el la kongreso, sed ne apartenanta al AMO. Tamen, ili estos ĝueblaj. La enhavo de AMO aperas flave.

• Vendredo 08-04-2022

• **16:00 - 17:00**

• SMG: ISAE: iam, nun kaj perspektive (dissendota nur postevente)

• **18:00 - 19:00**

• Prelego: Teleskopoj en la Spaco: de Hubble ĝis James Webb
– Amri Wandel

• **20:15 - 21:15**

• Koncerto de A.M.O. (Ukraina grupo)

• **21:15 - 22:00**

• Kabaredo Verda Banano – Saša Pilipović kaj Georgo Handzlik

Sabato 09-04-22

• **16:00 - 16:45**

• Prelego: La rolo kaj historio de AIS kaj IKU (la kongresa universitato). Amri Wandel.


• **16:45 - 17:30**

• Koncerto de Saša Pilipović – Ciganaj Kantoj

• **17:30 - 18:00**

• Ferma kunveno de la kongreso.

<https://www.sciencia-asocio.com/>



Du seminarioj, du transportoj de ekstazo: Trajnoj por surtera kaj daŭripova vojaĝado, Spacveturiloj por ekstertera vojaĝado. La teleskopoj malfermis la vojojn al tio!



AMO – la ĉiamo AMO – la ĉiamo AMO - la ĉiamo AMO – la ĉiamo

Du pliaj kursoj – Brazilo kaj Germanio

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis du novaj eroj ĉe la Kursejo. Jen estas kelkaj informoj pri ili:

Nomo: KVHS Uelzen
Gvidantonomo: Zsófia Kóródy
Tipo: Nova lerneja kurso
Loko: Uelzen, Germanio
Aldoninto: herzbergcentro

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27407>

Nomo: Baza Kurso de Esperanto - Kulturdomo
Gvidantonomo: Fábio Roberto SILVA
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Pouso Alegre, Brazilo
Aldoninto: esperanton

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27409>

Nova elsendo el Madagaskaro

La marta numero de ELSEENDO N°118 de Aminda Radio Esperanto enhavas diversajn interesajn temojn pri Malagasio kaj la malagasa popolo. Vi povas sekvi la duan parton pri la skizo de islamo en la Granda Insulo. Alia granda premiero por nia retradio estas la skeĉo titolita « Pureco » verkita de nia samklubanino Ranja kaj kunludita de Erica kaj Henriel. Protektado de la medio estas la ene traktita temo. Krome, ni proponas al vi kanton de Krzysztof Daletski kaj Fidelia Dalitz en la germana. Kaj kelkajn novaĵojn de la kuranta monato prezentas al vi Henriel kaj la samklubaninoj Erica kaj Midera. Ni bondeziras al vi agrablan aŭskultadon.

<https://youtu.be/5fd8izgnYm4>

===== vortoj: 825 =====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis la **fino de 2021** (per EKO 2021-58). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro deposed 2014.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill@e-mail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolisto.